Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KAJ NOVZELANDO

http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

PLENUMITA 21/03/2015 Ducent naŭa eldono 21/03/2015 SENDITA (unua eldono 20/09/2011)

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Nicole Else



SENDATA AL 275 La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Brunaj literoj signifas reuzatan sed gravan informon **ABC malnova**

Nigraj literoj signifas novan aŭ ĝisnunigitan informon **ABC nova**

Ctrl+alklaku la verdajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Esperantajn ligojn

Ctrl+alklaku la bluajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Anglajn ligojn

Pasintaj numeroj de 'A E' http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

★ ★

Esperanto-ŝlosilo Uzu, fordonu, semu Esperanto-semojn. EFNSK havas kopiojn.

Du pecoj de A4 papero bezonataj por presi la 32-paĝan libreton http://aea.esperanto.org.au/sxlosilo/?lang=eo



Estontaj kompetentaj Esperantistoj

aŭskultas la retradion (Esperantujo) ĉiun tagon

http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine

Metu la adreson en viajn preferatajn programojn kaj tage Klaku, Aŭskultu, Spertiĝu

63. LA GRAMATIKO DE ESPERANTO

LA PREPOZICIOJ. G.



Kiel mi ĵussemajne substrekis, la gramatikaj reguloj de Esperanto estas nepre obeendaj por certi, ke la lingvo ne degeneras al mallogika kaj komplika lingvo simila al la etnaj lingvoj. Tial bedaŭrindas, ke Zamenhof enkondukis verbigitan prepozicion por la kontraŭa signifo. Temas pri "peri", kiu laŭ la reguloj signifas "esti per", kiel en "La vojaĝo peris aŭtobuson" kaj "La distribuado peras la poŝtservon". Imitantoj malĝuste uzas "peri" por la kontraŭa signifo en "Ni peras ĉiujn librojn" dum devas esti "Ĉiuj libroj peras (= estas per = uzas) nin", kaj "Ili peras la necesajn informojn", kio devas esti "La necesaj informoj peras (= estas per) ilin". Konsekvence la vorto "peranto" signifas la librojn kaj la informojn, kaj la personoj estas la peratoj. Alternative oni povas uzi la

vortojn agento kaj agenti, kiel en “Ni agentas ĉiujn librojn” kaj “Ili agentas la necesajn informojn”.

Pro tiu eraro iu franca Esperantologo konata same malĝuste kreis la novan prepozicion “far”, ne komprenante la aglutinan strukturon de Esperanto. “far” formas “fari = esti far”, do “La libro far la verkisto” signifas ke “La libro faras (- estas far) la verkiston”, ĝuste la kontraŭon de la intenco. Kaj tiel tiu eraro kreas novan verbon “fari” signifantan la kontraŭon de la jam ekzistanta verbo “fari”. Abomeninda misaĵo, kiu ne decas por Esperanto!

Marcel Leereveld.

Sendu viajn fejsbukajn Esperanto-novaĵojn ankaŭ al la Novaĵletero.



Novaĵoj pri la Esperanto-Doma Gastdormejo

La ĉefa rolo de la Gastdormejo estas helpi la anojn de EFNSK ĉeesti EFNSKajn kunvenojn, per eventuala dumnokta dormloko ĉe ED post aŭ antaŭ la kunvenoj.

La **GASTDORMEJO** de EFNSK devas esti antaŭmendita de estontaj Esperantistaj gastoj. Neniuj Esperantistoj loĝas tie aŭ proksime por helpi gastojn.

Se eble antaŭmendu almenaŭ 2 semajnojn antaŭe. Tio helpas nin prepari la gastdormejon.

Sendu ĉiujn petojn por resti ĉe la gastdormejo al la Sekretario per retmesaĝoj al:

gymea@hotmail.com; rspring@tpg.com.au; **kaj** nsw@esperanto.org.au;

Esperanto-Domo Sidnejo



La 5an de aprilo 2015 okazos la venonta kunveno

Merkredon la 18an de Marto venis Roger Springer, Ian Wylles kaj Margaret Chaldecott.
Ili laboris farante necesajn taskojn ĉe ED.


La„outreach and education sub-committee” havis sian duan kunvenon la 18an de Marto. Ĉeestis Roger Springer, Ian Wylles kaj Gerry Phelan. La komitato raportos pri siaj progresoj ĉe la venonta aferkunveno je 5a de Aprilo

Benny Lewis en Sidnejo



La libroprezento de Benny Lewis en Sidnejo okazos venontan semajnon la 26an.
https://www.facebook.com/events/277202802403878/
En la libro Benny ja iomete skribas pri Esperanto. Amike, Nicole







Mia artikolo pri Esperanto ĵus aperis sur la retejo de Kid World Citizen
http://kidworldcitizen.org/2015/03/15/esperanto-for-kids/
Amike, Nicole

Niaj Legantoj Komentas

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

1) Mi aŭskultis Charlotte Burton kaj ankaŭ la grupon de denaskaj E-istoj; tre interesaj geĉarmuloj. AE208 V.

★★★★



La Manlia Esperanto-Klubo.

Anoj kunvenas la unuan kaj trian Sabaton. 10 a.t.m.

Bavarian Beer Cafe, Manly Wharf; Unu taso da senpaga kafo

La venonta kunveno okazos je 21a Marto. Venu!

AEA Informas

Aŭstralia Esperanto-Asocio

ACN 121 495 789 C/- G.P.O. Box 2122, Melbourne 3001

La venontaj Skype kunvenoj estos jaŭde 09/04, 30/04, 21/05, 11/06, 02/07, 23/07

2015-03-19 AEA raportas:

Nian lastan Skype estrarkunvenon (19/03/2015) ĉeestis:
Indrani, Joanne, Jonathan kaj Sandor kaj ankaŭ Bradley el NZ kaj Ilia el Indonezio iomete.

*** VENONTA KOMUNA KONGRESO EN BANDUNG (INDONEZIO) – PASKO(MARTO) 2016**

Bradley konfirmis oficiale ke NZEA ja partoprenos nian trilandan kongreson en Bandung venontjare. Bone.
Ni kalkulu kaj proponu kotizon por la eksterlandanoj kaj la indonezianoj.
Ni ankaŭ daŭrigu pensi pli pri gravuloj: Mark Fettes, Yasuo Hori, aliaj???????

*** ARĤIVO**
Huigh ne povas viziti Sidnejon tiom ofte. Tamen li klopodas kunlabori kun Ian Wylles.
*** ESK** La ĵurnalo estas ĉe la presisto.
La venonta Skype estrarkunveno okazos jaŭdon, la 9-an de aprilo 2015, je la 19:00 (18:30)
Bradley kaj Ilia refoje partoprenos iomete.
Indrani, Joanne, Jonathan, Sandor

Duolingo

Karaj,

La kreado de Esperanto-kurso bone progresas. Nun 90.1% estas jam faritaj kaj la kurso pretos post proksimume unu monato. http://moviemap.me/duoinc/
Jen artikolo en kiu ni povas legi ke 70 milionoj da personoj uzas Duolingo-n inkluzive de Bill Gates! http://www.theguardian.com/business/2015/mar/08/learning-the-duolingo-how-one-app-speaks-volumes-for-language-learning Amike, Nicole

Lokaj Aŭstraliaj Esperanto-Kluboj	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu	Vidu
AEA informas	xxxx	AE185	xxxx	AE187	xxxx	AE189	xxxx	AE191	xxxx	AE193	AE194	AE195	AE196	xxxx	AE198	AE199	AE200	xxxx	xxxx	AE203	xxxx	xxxx	AE206	xxxx	xxxx	AE209
Centra-Marborda Esperanto-Klubo	xxxx	AE185	AE186	AE187	xxxx	xxxx	xxxx	AE191	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE206	AE207	xxxx	xxxx
Esperanto-Federacio de Nov-Sud-Kimrio	AE184	AE185	xxxx	AE187	xxxx	AE189	AE190	AE191	AE192	AE193	AE194	AE195	AE196	AE197	xxxx	xxxx	xxxx	AE201	AE202	AE203	AE204	AE205	AE206	AE207	AE208	AE209
Esperanto en Sudaŭstralio	AE184	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE189	xxxx	AE191	xxxx	xxxx	xxxx	AE195	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE203	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Esperanto-Federacio de Viktorio	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE196	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Esperanto-Ligo de Okcident-Aŭstralio	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE192	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Esperanto-programo de 3ZZZ Aŭstralia	xxxx	xxxx	xxxx	AE187	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE192	xxxx	xxxx	AE195	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Manlia Esperanto-Klubo	AE184	AE185	AE186	xxxx	AE188	xxxx	AE190	xxxx	AE192	xxxx	AE194	xxxx	xxxx	AE197	xxxx	xxxx	xxxx	AE201	xxxx	xxxx	AE204	xxxx	AE206	xxxx	AE208	xxxx
Melburna Esperanto-Asocio	xxxx	xxxx	AE186	xxxx	AE188	AE189	xxxx	AE191	xxxx	xxxx	AE194	xxxx	AE196	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE203	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Melburna "Meetup" Grupo	xxxx	AE185	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	AE202	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Klubo de Noumea (Nov Kaledonio)																			AE202	AE203	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Aliaj Landaj kontribuantoj																								AE207		
Brisbana Esperanto-Kafo-Klubo	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Brisbana Esperanto-Societo	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Esperanto -Kafo-Klubo De Kanbero	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Tasmania Esperanta Societo	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Toowoomba Esperanto-Societo	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx
Torkia Esperanto-Kafo-Klubo	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx	xxxx

"Informu AE, se estas eraro en la listo" rspring@tpg.com.au

Reklamu vian klubon - Sendu informon.



Niaj novaĵoj
venas el viaj
retmesaĝoj.

INFORMU la
Novaĵleteron
kaj la MONDON.

